6/2000
Oktobro/Novembro
Bulteno de Hamburga Esperanto Societo r. a.

| Sentenco | Editorajhoj |
| --- | --- |
| Nur tiu,<br>kiu nenion faras,<br>ne faras erarojn. | Redaktofino de Hamburg Esperanto<br>n-ro 1/01: 15-11-2000<br>Eldonanto: *Hamburga Esperanto-Societo r. a.*<br>Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg<br>Tel/Faks: +49 40 250 30 65<br><br>Prezidanto: Jürgen Wulff<br>http://www.juergenwulff.de<br><br>Redaktoro: *Benno Klehr*<br>Stormsweg 7<br>22085 Hamburg<br>Tel: 0 40-43 18 83 47 |
| La HES Klubejo estas malfermita Jhaude ek de 19:00 h.<br>Programo: 20:00 h.<br>GIS: kunvenoj laubezone;<br>Informoj:<br>Tel. (040) 58 71 82 au 39 19 44 14 | Das Haus des Esperanto Vereins Hamburg ist geöffnet donnerstags ab 19:00 Uhr.<br>Programm: 20:00 Uhr<br>GIS: Zusammenkünfte nach Bedarf;<br>Information:<br>Tel. (040) 58 71 82 oder 39 19 44 14 |

## Akvo de supre - akvo de malsupre

La tegmento de la kluba domo jam ofte kauzis problemojn.
Nun ni denove havas likajhon. Elsbeth kaj Jürgen organizis labor-teamon. Ni riparos la tegmenton helpe de amikoj dum semajnfino por shpari kostojn.
Alia malagrabla surprizo dum semajnfino la 16an de Septembro atendis Elsbeth: La suba etagho volis farighi naghejo!
La inundon kauzis rompita tubo de la hejtilo. Elsbeth vokis fakulon por ripari kaj kune kun nia purigistino multe laboris por sekigi la plankon.

Benno Klehr

Enhavo

**Nia programo**

| Oktobro | Novembro |
| --- | --- |
| **8** ***Werner Bormann:***<br>Impresoj el Israelo kaj la UK 2000<br><br>**12** ***Edrolali Ahiakpor:***<br>Esperanto-movado en Togolando<br><br>**19 Klubaj Aferoj:**<br>Varbshildfarado<br><br>**16** ***Sylvia Pöhlmann***<br>Kultura E Festivalo en Finnlando | **2 Klubaj Aferoj:**<br>1. Zamenhoffesto<br>2. Kie tranoktos IS-Partoprenantoj<br><br>**9** ***Klaus Diekmann:***<br>Video-scenoj el la pasintaj jaroj<br><br>**16** ***Benno Klehr:***<br>Terura Enigmo<br><br>**23** ***F. Marques Freitas:***<br>Hejmlando Brazilo<br><br>**30 Klubejo fermita pro sabata festo** |

# Zamenhoffesto 2000

de Hamburga Esperanto-Societo

**2-a de Decembro**, 19-a horo

kun menuo kaj distra programo

**Bovolu anonci vian partoprenon al**

**Elsbeth Wielgus, Tel. (040) 254 29 36**

---

**Ekspozicio**

La ekspozicio *Du und Deine Welt* ankau en tiu chi jaro etis multe vizitita. La Esperanto-stando denove trovighis en halo 4 kaj tuj estis rekonebla, char ghi aspektis tute same kiel en la pasintaj jaroj - malgrau proponoj, shandgi la prezentatdon. Sed ne sufichis niaj laborfortoj por efektivigi novan standon.

Post la ekspozicio kiel chiujare okazis sabata provleciono en la klubejo. Trovighis sufice da interesitoj por nova kurso.

Benno Klehr

## Nova kurso en Hamburg

**Datoj:** Sabato, 30.9. / Dimancho, 8.10. / Dimancho, 15.10. / Dimancho, 22.10. / Dimancho, 5.11. / Dimancho, 19.11.
**Tempo:** 14.00 h ghis 17.00 h
**Loko:** Esperanto-Domo, Klaus-Groth-Straße 95, 20535 Hamburg

### Post la IS de Cuxhaven al Hamburg

La tradicia Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en tiu-chi jaro okazos proksime de Hamburg, en Cuxhaven-Dunen, de la 27a de Decembro 2000 ghis la 3a de Januaro 2001.
Venos multaj junaj homoj el diversaj landoj. Cere kelkaj el ili shatus poste viziti Hamburgon kaj tie bezonos lokon por tranokti.
La 2an de Novembro ni parolos pri eblecoj de gastigado en la klubejo.

Re al Esperanto en Hamburg